

# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 37an jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k130/k130.html>

*Ne ploru kiel infano pro tio, kion vi ne faris kiel adulto*



*Ni ĉiuj mortos..., kvankam ne hodiaŭ*

N<sup>o</sup> 130<sup>a</sup>

Januaron de 2024<sup>a</sup>

**Kajeroj**

Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

**el la Sudo**

Calle Jabonerías, 6.3° D  
30010 Murcia  
Hispanio

**Enhavo**

<b>Redaktore:</b> Ni ĉiuj mortontas.....	3
<b>Politiko:</b> Submarŝipetoj.....	5
<b>Kulturo:</b> Prezentismo.....	6
Feliĉan Kristnaskon.....	9
<b>Defendo de Hispanismo:</b>	
Prezento.....	10
Moderna humanismo.....	11
Humanismo de fiereco.....	13
Materiisma humanismo.....	15
Nia humanismo en kutimoj....	17
Nia humanismo en la historio.....	19
Fina resumo de la afero.....	22

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies enhavo mistraktas neniun personon.

**Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.**

**Kovrilo:** Ni ĉiuj mortontas, ni ĉiuj mortos iam, sed la procezo jam komencis kiam ni naskiĝis. Sed ne timu: tio estas normala.

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

**Se vi deziras kontribui per aliĝo, kontaktu la redaktoron:**  
**[kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondicè, ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
**Scribus, Bluefish, LibreOffice, Gimp, kaj Yafc.**

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.



Redaktore

## Ni ĉiuj mortontas

Oni kutime ne parolas pri morto. Ŝajnas, ke oni vivas dorse al morto, kaj sekve, kiam amiko aŭ familiano mortas, estas grava katastrofo por oni kaj familio onia!

Tamen, oni memoru, ke ni ĉiuj naskiĝis. Jen la nemalhavebla kondiĉo, por ke oni povos morti: **nur tiuj, kiuj vivas, povas morti.**

Mi vidas, ke ĉiuj kredas pri io, kaj nur ateistoj neas, ke post ĉi tiu vivo (*kvazaŭ estus alia!*, ili protestas) estos alia vivo, sed ceteraj homoj kredas, ke ekzistas alia vivo, ĉu en Paradizo (aŭ Infero), ĉu oni denove naskiĝos por *bruli karmon* foje kaj refoje ĝis kiam oni jam meritos iri en Paradizon, ĉu oni nepre iros en sekvantan dimension, ĝis oni finfine unuiĝos kun la Universala Konscienco, ĉu oni nomu ĝin Dio, ĉu alimaniere.

Sed estas strange, ke plejparte da neateistoj agas kvazaŭ ili kredas nenion, ĉar al ili doloras kaj ili plendas, kiam familiano aŭ amiko jam mortis. Ne estas konsolo por ili scii, ke la mortinto jam estas en Paradizo, la sekvanta dimensio aŭ jam renaskiĝis aliloke en la mondo! Ateistoj, tamen, akceptas, ke jen la fino de ĉio, kaj ili ĝojas, ke ili vivas.

Sed kaj ateistoj kaj neateistoj

mortos, tio estas la universala vero. Naskiĝi ekzakte vi, leganto, estas tre hazarda afero: Se anstataŭ la spermatozoo, kiu atingis la ovon de via patrino antaŭ la aliaj, alvenus pli frue alia ajn inter la milionoj, kiuj konkuris tiam, ne vi ekzistus, sed iu ajn alia persono. Kaj se via patro ne unuiĝintis al via patrino en tiu ekzakta momento, ankaŭ vi ne legantus ĉi tion nun, ĉu vi ne konsentas? Sed, sekve, ĉiuj, kiuj jam naskiĝis jam mortis laŭ homa historio—he, ni diru, besta historio, ankaŭ—, escepte de tiuj, kiuj ankoraŭ ne mortis..., provizore.

Kiam oni intencas vojaĝi aliloken, oni pretigas sin kaj aliajn aferojn: oni prenas bileton, adiaŭas familianojn kaj amikojn, kaj certigas sin pri tio, kien oni iros kaj kion oni trovos tie. Sed estas ŝoke, ke neateistoj ne pretigas sin kaj konatulojn siajn por tiu vojaĝo, la ĉefa kaj lasta vojaĝo de sia vivo, kvazaŭ ili neniam faros tiun vojaĝon. Absurde, ĉu ne?

En nia socio oni ne parolas pri morto, kaj tion fari estas konsiderata malbonŝanca kaj maleleganta. Sed mi trovas tiun tabuon stulta: oni nepre pretigu sin. Multaj el ni certe jam oficialigis testamenton, kaj eble ankaŭ Dokumenton pri Lastaj Deziroj,

per kiu oni decidas kion fari kiam li aŭ ŝi malbonfartos tiom malmole, ke ne eblis al si paroli por diri sian volon, kaj aliajn decidojn, kiel ekzemple ĉu morti en hospitalo, ĉu hejme, ĉu kion fari kun la kadavro. Ankaŭ kontrakti asekurpolison por ke familianoj ne havos problemojn post la morto. Eble. Sed plej ofte, laŭ mia eltrovo, neniu faras tion. Pro tio mi diras, ke en nia socio oni vivas dorse al morto. Kaj tio estas stulta kaj problemiga!

Mi laste havis kurson unujaran en asocio **Metta**<sup>1</sup> pri tiuj aferoj, kaj tio venigis min en tre praktikajn konsiderojn, kiujn mi deziras kunhavi al vi, legantoj, se vi ankoraŭ estas kun mi ĉi tie. Mi tion faris ĉar mi jam atingis aĝon el kie mi ofte vidas morton: mankas al mi samideanoj kaj geamikoj, eĉ gelernintoj miaj! Kaj tiu kurso havas allogan nomon kaj enhavon: *Kurso Eksperto pri Akompano en la Proceso Morti*. Kaj certe morto ne estas subita evento, sed tuta proceso, kiu komencas je la momento kiam oni naskiĝas.

Certe, estas konstruado de persono kaj personeco de kiam oni naskiĝas ĝis kiam oni jam estas plenkreskulo..., ni diru ĉirkaŭ je 25<sup>a</sup> jaraĝo. Post tiu aĝo nia korpo komencas difektiĝi iom post iom: nia vidpovo ne estas same kiel antaŭe, niaj organoj ne plu funkcias tiom bele, kvankam la proceso estas tiom malrapida,

ke oni ne atentis al tio, ĝis kiam doktoro diras, ke ni devas uzi okulvitrojn aŭ pilulojn, aŭ ke ni devas operaciumi, aŭ ke ni devas eviti kelkajn manĝaĵojn...

Do, por pretigi sin por la lasta parto de nia vido, nia morto, ni devas unue forlasi tiun timon, kiu ni sentas pri ĝi: tio estas naturala, ĝi venos, ĉu oni volos, ĉu oni ne volos. Kevedo, nia literaturisto de la 16<sup>a</sup> kaj 17<sup>a</sup> jarcentoj, cinike diris, ke *morto ne ekzistas, ĉar dum vi estas, ĝi ne estas, kaj kiam ĝi estas, vi ne plu estas*. Kaj vere morto ne ekzistas, sed homoj, kiuj mortas.

Kaj konsideru, ke nur tiu, kiu scias vivi, scias morti. Morti, same kiel ĉiu alia afero, povas esti bone farita, aŭ malbone. Ni ĉiuj povas pentri, sed nur kelkaj scias kiel pentri, ni ĉiuj povas verki, sed nur kelkaj povas verki scipove, ni ĉiuj povas paroli, sed ne ĉiuj povas paroli bone. Sekve, ni ĉiuj mortos, sed ne ĉiuj mortos scipove.

Sekve, kion fari? Ĉu estas akademio por ke oni lernu kiel morti? Eble akompanante mortantojn oni lernos kiel morti bele, klare kaj elegante. Oni perdu timon, kaj akiru ripozon kaj trankvilon pasigi la finan punkton de nia procezo morti, kiu komencis je la momento, kiam ni naskiĝis.

Sed Esperanto estu senmorta, ni esperu. **Ni senmortigu ĝin!**

<sup>1</sup><http://www.fundacionmetta.org>



## Kulturo

## De arkarta fiero al submarŝipetoj

Oni laste kritikis min pri la Okovrilo de nia numero 128<sup>a</sup>, tiu pri balotado kaj nebalotado, plendante, ke la redaktoro de ĉi tiu magazino estas malĝentila, ĉar oni povas ne baloti kaj tamen esti pli civiliza.

Tamen, tiu kritiko rivelas grandan ignorantecon: tiun signon faris anglaj arkistoj al franca armeo en unu el siaj militoj, la Milito de Cent Jaroj, montrante, ke ili ankoraŭ havas sian mezfingron, kaj sekve ili ankoraŭ povas lanĉi siajn sagojn. Oni komprenas kial ili faris tion, se oni memoras, ke francoj fortranĉis tiun fingron al anglaj soldatoj kiam ili kaptis ilin. Arkistoj anglaj bone celis, kompreneble.

Se oni serĉas en la reto, eble oni trovos aliajn eksplikojn, sed laŭ mi ĉi tiu estas la plej korekta. Per tiu signo mi celis diri, ke el ĉi tiu modesta magazino oni ankoraŭ povas lanĉi niajn ideojn, eĉ pafi al maljusteco kaj mensogo historia pri Esperanto, labormondo, Hispanio, eĉ ni, por ke vero estu restarigita. Ĉu naiveco? Eble. Sed memoru, ke nur naivuloj antaŭenigis kulturon, pacon, kaj eĉ la mondon. Ekzemple: Zamenhof kaj Izaak' Peral'. La unua kreis nian mirin-

dan lingvon, kiu ebligas al ni paroli kun homoj de kulturoj tiom diversaj, ke ni ne povus per nia aŭ ilia lingvoj; kaj Peral' elpensis submarŝipon, eĉ se siaj samtempuloj ridaĉis al li pro envio aŭ aliaj evitindaj kialoj..., kaj tamen alilandaj registaroj pretigis siajn proprajn submarŝipojn vidinte, ke la aferon oni povas fari.

Estus dezirinde, ke plej povaj landoj en la mondo decidus apogi Esperanton same kiel ili apogis la ideon fari submarŝipojn. Nur Sovetunio faris tion, sed nur dum la regado de Lenin. Lia postulo, Ŝtalin', komprenis, ke la komunisman kredon Rusujo ne povus instali en la ceteran mondon, kaj sekve li forgesis pri Esperanto, enkarcerigis aŭ mortopafis ties gvidantojn, kaj rusiigis sian imperion.

Tamen, dum restos homoj bonkoraj, kiuj celas komprenigi sin al kaj de alilingvanoj, ni restos intermksitaj interne de lingvimperioj kvazaŭ ni estus submarŝipetoj de bonkoro kaj deziro komuniĝi kun alilandanoj.

**Vivu Esperanto!  
Vivu la Interna Ideo de  
Esperanto!**



## Prezentismo

**P**rezentismo asertas, ke oni ne juĝu pasintajn eventojn kaj personojn per nunaj konceptoj aŭ antaŭjuĝoj. Ekzemple, oni ne povas juĝi islamanojn kiel masklistojn, ĉar ili apartenas al alia kulturo, aŭ al prahistorianojn kiel murditojn ĉar tiutempe oni ĉu mortigas ĉu mortatas.

Mi tute ne kongruas kun tiu ideo, kvankam mi ankaŭ ne estas tute fremda al tio. Tiu koncepto, **prezentismo**, ja kongruas kun **politika korekteco**, kvazaŭ per tio oni povas malkulpigi genocidojn en la pasintaj tempoj, kaj samtempe kulpigi tiujn de la nuna momento; tio estas: oni kondamnu tiujn, kiuj nun faras same kiel oni faris en la pasinto.

Laŭ mia kriterio tio ŝajnas hipokrita kaj dunivela: se genocido estas malbona, oni kondamnu ĝin laŭ la tuta periodaro de la homa historio. Kaino malbone agis kiam li murdis fraton Abelon, eĉ se ne estis leĝo tiame malpermesante tion. Kaj oni vidu, ke Adamo mortigis neniun homon, do eĉ sub la tiama kutimo, Kaino ankaŭ restas murdisto kaj malbenata de Dio. Kaj de ni.

Jes, mi komprenas, ke leganto povas esti ne dikredanto, sed

temas nur pri ekzemplo, ĉu vere historia, ĉu mita: la fakto estas same.

Nun ni havas alian sentivecon, kaj de nun ni devas koni kaj prirezoni pasintajn eventojn, tio estas, ni devas opinii laŭ ni, kaj ne laŭ romianoj, babilonanoj aŭ ostempuloj. Mi konsentas, ke ni havas nunajn antaŭjuĝojn, kaj nia juĝo ne liberiĝas pri ili, ĉu konscie, ĉu nekonscie. Sed se en dubo, oni povas rilatigi pasintajn eventojn al aliaj pasintaj eventoj, kaj juĝi, kiuj estis pli justaj ol kiuj.

Ni konsideru, ekzemple, la genocidon de indianoj, pri kiuj oni akuzas hispanajn konkrintojn de Ameriko. Tiutempe **Papo Aleksandro 6<sup>a</sup>** mendis de la regnoj de Kastilio kaj Portugalio la konkeron de nekonataj landoj por konvertigi ties landanojn en la veran religion, t.e. kristanan fidon. Tio estis verŝajne logika mendo, ĉar la ceteraj eŭropanoj havis aliajn problemojn —inter ili bati unu la aliajn— kaj la du iberaj regoj jam forpelis islamanojn, kiuj ankoraŭ minacis la ceteran Eŭropon el oriento.

Nu, kiel sciante, aliaj povoj eŭropaj, kiel Nederlando kaj Anglujo, forlasis la Vatikanan regon

kiam ili deklaris sin protestantaj, kaj estis nur logike, ke ili ne plu devos observi la deziron de la Papo, eĉ pri geografiaj aspiroj, do iom post iom ili provis akiri novajn landojn, unue per pirataj manovroj, kaj poste rekte per konkero. Tiel la **Gepatroj Pilgrimaj** venis en la orientan parton de Nordameriko, kaj eĉ se dekomence ili estis helpataj de ties jamloĝantoj kiam ili havis malfacilojn, ili ĉiam konsideris, ke indianoj estis subkastaj homoj, se ne bestoj, kiujn oni devas ekstermi por preni la lokon laŭ deziroj de Dio. Eĉ hodiaŭ en Usono oni kredas, ke oni devas profiti ĉion, kion oni povas, kaj ke tio ne estas malbona ago.

Ankaŭ mi ne komprenas kial portugaloj sklavigis indianojn, kontraŭ la deziroj de la mesaĝo de Kristo, vortumigita de la ordo de Papo Aleksandro 6<sup>a</sup>. Ankaŭ Kristoforo Kolombo, la malkovristo de Ameriko, faris tion dekomence, sed pro tio oni katenigis lin —interalie— kaj enkarcerigis lin, eĉ se **Reĝino Elizabeto I<sup>a</sup>** liberigis lin tuj, sed reordonante al li, ke li **konsideru indianojn kiel gefilojn de Dio, kaj pro tio, oni ne povas sklavigi ilin.** Ameriko ne estis tiam bieno, sed pligrandigo de la Reĝlando de Kastilio. Tion cetereŭropanoj ne komprenas, eĉ hodiaŭ.

Oni povas argumenti, certe, ke preĝistoj kristanaj akompanante konkerintojn hispanajn, devigis indianojn brakumi la Eklezion de Kristo, sed tio estas falsa, kiel historio kaj logiko pruvas: dekomence, preĝistoj preĝas, kompreneble, same kiel kuracistoj kuracas kaj prelegantoj prelegas. Tamen estas faktoj, ke:

Preĝistoj kaj monaĥoj lernis la indianajn lingvojn por komuniki sian mesaĝojn al la novaj subuloj de la Krono de Kastilio, indianoj de Ameriko, kaj fakte ili **verkis gramatikojn**, por ke alvenantaj preĝistoj kaj monaĥoj en Amerikon povos paroli kun lokuloj, kaj diri al ili pri la nova kredo. Sekve, kristanoj ne devigis la hispanan lingvon sur la indianojn, male al tio, pri kio oni akuzas nune al konkeritoj hispanaj. Tion diras historio. Sed pri logiko..., ni vidu: kiam hispanoj alvenis en la kontinenton, ili trovis homojn, kies religio devigis ilin manĝi venkitojn — kaj fakte iliaj armiloj vundis, sed ne mortigis pro tio—, kutimo, kiu ĉesis nur pro la alveno de hispanoj en teritoriojn de Mezkaj Nordameriko, ĉar tio prinaŭzas kristianajn hispanojn. Kaj subite indianoj trovis —pere de ekleziuloj hispanaj— religion kiu diras, ke homo ne manĝu homon, sed homo manĝu Dion pere de religia ceremonio, eŭka-

ristio. Logiko diras, ke homo preferas manĝi Dion, kiu neniam manĝos homon, ol manĝi homon, aŭ esti manĝata de homo!

Do **hispanoj** ne altrudis sian religion, almenaŭ ne rekte, al indianoj, kaj **konsideris ilin samrajtaj kiel sin mem, laŭ ordono de la Reĝino** de Kastilio de la 15<sup>a</sup> jarcento.

Sed tio ne okazis en la landoj konkeritaj de angloj **de du jarcentoj poste**: sekve, oni ja povas juĝi la misfarojn de angloj en Nordameriko el vidpunkto de 15jarcenta hispana vidpunktoj, ĉu ne? Certe, estas kialoj, kiuj eksplikas tiun diferencon, eĉ se — mi denove avertas— ekspliko ne estas justigo aŭ senkulpigo:

Hispanojn devigis la deziro de la papo —sub peno pro peko — kaj tiusencaj leĝoj de la Reĝino —sub risko de puno, kiel eĉ la unua admiralo de Kastilio mem, Kristoforo Kolombo spertis en sia propra karno—. Sed Martin' Lutero, la patro de ĉiu protestantismo, diris *Peku multe, kedu pli, kaj saviĝos vi*. Sed fondinto de protestantismo mem, li defendis, ke la fidon oni povas devigi per glavo, kaj fakte li konsilis la germanajn princojn tion fari kaj eĉ militi kontraŭ la Imperiestro, Karlo 5<sup>a</sup>, por defendi sian fidon. Post longa milito,

oni atingis pacon, kiu deklaris, ke ĉiu subulo havu la kredon de sia princo!

Tio ne okazis en la sudo de Eŭropo, kiu restis ene de la de tiam nomata Katolika Eklezio. *Katolika* signifas de tiam Univerŝala, kaj tiu universaleco realigis fakte pro la disvastigo de kristanismo fare de hispanaj religiuloj en Ameriko kaj insuloj de Pacifika Oceano poste.

Protestantoj, sekve, konsideris sin la elektita popolo de Dio, kaj tiuj, kiuj ne honoris sian religion ne rajtas vivi, kaj pro tio ili mortigis indianojn en lando de nuna Nordameriko. Sed atentu, ke angloj konkeris nur la landojn kie kuŝas la 13 plej orientaj ŝtatoj de Usono. Sed post la sendependiĝo de Meksikio (je jaro 1821<sup>a</sup>), Usono militis kontraŭ ĝi (1848<sup>a</sup>) kaj konkeris la plej grandan parton de la lando meksika. Se oni rigardas la suban mapon, oni vidos, ke Novhispanio etendiĝis de preskaŭ Kanado al preskaŭ nuna Venezuelo, ĉar Nova Granado inkluzivis nunan Panamon, sed Nova Hispanio inkluzivis de la cetera Centroameriko ĝis Nuna Oregon'.

La bonon de Hispanio en Ameriko oni povas vidi en tio, ke nur la ŝtatoj de Usono, kiuj apartenis al Novhispanio entenas rezervujojn indianajn. La aliajn indianojn genocidis angloj kaj usonanoj.





Kulturo

## Feliĉan Kristnaskon

Ŝajnas, ke de Eŭropo oni diras la ni, ke ni ne plu deziru **Feliĉan Kristnaskon!**, sed **Feliĉan Festumadon!**, ...**Solticon!**, aŭ iun ajn alian stultaĵon, por ne ofendi ulojn de aliaj religioj.

Nu, kiam niaj virinoj vizitas islamajn landojn, oni postulas, ke ili vestu vualon ne ofendi la lokan kulturon..., do mi ne komprenas, ke la registoj de Eŭropo konsilu tion, ĉar se islamanoj venas en Eŭropon, ili devas reciproke respekti niajn kutimojn kaj religion, kaj se ili ne pretas fari tion, ili restu ĉe si. Tio estas justa, ĉu ne? Sed jen la nivelo de la politikistoj, kiuj regas nian landaron, Eŭropo. Pro tio la ekonomia asocio neniam iĝos ununura lando politike aŭ kulture.



Aliflanke, ni vivas en materiisma mondo en kiu homoj donas iPad-ojn anstataŭ librojn, kie homoj donas monon anstataŭ kisojn, kie ili deziras unu al la alia bonan tempopasigon ĉe Kristnasko anstataŭ kunhavi feliĉon. Kaj ĉi tio estas malĝusta. Oni volas amuziĝi **farante** aferojn anstataŭ **esti** feliĉa senti tiel. Ĉar tiu, kiu trovas feliĉon en si, estas la sola, kiu povas ĝin kunhavi al aliaj.

Antaŭ kelkaj tagoj oni demandis min en la angla klaso, per kiom da mono mi estus feliĉa, kaj mi diris kun la minimumo manĝi kaj dormi ĉiutage. Sed nun mi trovas, ke mi eraris: ĉar eĉ se oni ne havas monon por manĝi kaj dormi, oni tamen povus esti feliĉa. Mi ne estus kontenta dum mi malsatas aŭ sendormas, kompreneble, sed mi estus same feliĉa kiel nun, ĉar feliĉo **ne estas STATO**, sed maniero **scii ESTI**.

Kaj dume homoj promesas feliĉon por venonta vivo, ĉu oni gajnu ĝin pere ĉu de bombado, ĉu de mesoj, ĉu de preĝado, senrigardante tion, kie feliĉo kuŝas: je la mezo de via koro! Ne serĉu ĝin ekstere, ĉar ekster via animo estas nur homoj, kiuj serĉas feliĉon tie, kie ĝi ne estas, ili kredas pli pri vortoj ol pri evidento.

Sekve, karaj gelegantoj, **mi deziras al vi Feliĉon Kristnaskan** kaj ĉian, kaj ĉiam vian. Tiam vi povos kunhavi.


Beletro

## Defendo de Hispaneco

Ramiro de Maeztu

Ĉi tiu hispana humanismo estas de religia origino. Ĝi estas la doktrino de homo instruata de la Katolika Eklezio. Sed ĝi tiel profunde penetris en la hispanajn konsciencojn, ke ili akceptas ĝin, kun etaj variaĵoj, eĉ la malplej religiaj. Ne ekzistas nacio pli malvolonta ol la nia konfesi la superecon de iuj popoloj super aliaj aŭ de iuj sociaj klasoj super aliaj. Ĉiu hispano kredas, ke tion, kion faras alia viro, ĝi povas fari. Ramon' kaj Kaŝal' sentis ĉagreno, kiel studento, kiam li vidis ke ne ekzistas hispanaj nomoj en medicinaj tekstoj. Kaj, sen konfidi sin al Dio aŭ al la diablo, li kaptis mikroskopon kaj ne el-lasis sian manon, ĝis la tekstoj devis kalkuli lin inter la grandaj esploristoj. Kaj la kazo de Cajal estas reprezenta, ĉar en la momento mem de humiliĝo kaj malvenko, kiam eksterlandaj ŝtatestoj kalkulis Hispanion inter la mortantaj nacioj, la hispanoj proklamis unu al la alia la Evangelion de regenerado. Anstataŭ ripetfrazo sanktan Aŭgustenon kaj diri al si, ke la vero loĝas en la in-

terno de Hispanio, ili iris al



fremdaj landoj por ekscii, el kio konsistis ties supereco, kaj ne plu estas dubo, ke la konvinko, ke ni povas fari tion, kion aliaj popoloj, ili ne povas fari; ne devos regeneriĝi, ĉar la senkondiĉa, abomena admiro de ĉio fremda ne postvivos la malsukceson, nun preskaŭ evidentan, de ĉiuj religiaj, moralaj kaj politikaj principoj, kontraŭe al nia tradicio, la mondo skuiĝis en ĉi tiuj jarcentoj.

La hispanoj estis farantaj tion,

sen esti stimolitaj, por la momento, de iu granda ekzaltiĝo de religieco, kaj kun la sola celo montri al si, ke ili povas fari tion, kion aliaj homoj povas fari. Sed kiam ili enprofundiĝas en la historion kaj miras pri la sekreto de la grandeco de aliaj popoloj, ili ankaŭ devas demandi sin pri la kaŭzoj de sia propra pasinta grandeco, kaj kiel en ĉiuj landoj la tempoj de prospero estas tiuj de fido, kaj de malkresko. tiuj de skeptiko, oni devas evidenti al ili, ke la horo de ilia maksimuma forto estis ankaŭ la horo de ilia maksimuma religieco. Kaj la kurioza afero estas, ke en tiu horo de supera religieco kaj maksimuma potenco, la hispanoj ne flatis sin per la ideo esti pli proksime al Dio ol aliaj homoj, sed, male, ili metis sur sin la akuzon alporti al aliaj popoloj la mesaĝo, ke Dio ilin nomas kaj ke la solenaj vortoj estas adresitaj al ĉiuj homoj: *Ecce sto ostium et pulse; si quis...aperuit mihi januam intrabo at illum...* (Mi estas sur la sojlo kaj frapas); se iu malfermas al mi la pordon, mi eniros), tial ankaŭ religio revenas nin al la tre propra homanismo de la hispanoj.

## Moderna humanismo.

Ĉi tiu nia sento de homo tre malmulte similas al tio, kion oni nomas humanismo en la moderna historio, kaj kiu originis en la

tempoj de la Renesanco, kiam, post la malkovro de grekaj manuskriptoj, akademiuloj trovis en la *Paralelaj Vivoj* de Plutarĥo, specojn de homoj. kiuj ŝajnis pli indaj servi kiel modelon al aliaj ol la sanktuloj de la *Kristana Jaro*. Ĉar la idealo estis tiel humanigita, humanismo esence signifis la resurekton de la kriterio de Protagoras, laŭ kiu la homo estas la mezuro de ĉio. Bona estas tio, kio ŝajnas bona al la homo; vera, kion vi kredas vera. Nu tion ni ŝatas; vera, kiu plene kontentigas nin. Vero kaj bono forlasas sian statuson kiel transcendantaj esencoj por fariĝi relativecoj. Ili ekzistas nur rilate al la homo. Humanismo kaj relativismo estas samsignifaj vortoj.

Sed se kio estas bona estas bona nur ĉar ĝi ŝatas al ni, se la vero estas nur vera ĉar ĝi kontentigas nin, kio estas bono kaj vero? Unu el du: reflektoj kaj esprimoj de la vero kaj bono de la homo aŭ ombroj sen substanco, vortoj kaj bruoj sen signifo, kiel la nominalistoj diris, ke ili estas universalaj konceptoj. Jam en la Mezepoko oni diskutis, ĉu kio estas bona estas bona ĉar Dio ordonas aŭ ĉu Dio ordonas ĉar ĝi estas bona. La ideo de Protagoro interveni en la disputon verŝajne estus, ke kio estas bona estas posedaĵo de iuj homoj, kaj ne de

aliaj. En la lastaj jarcentoj, tiu ĉi homaranismo sugestas al iuj homoj, kaj eĉ tutaj urboj, aŭ almenaŭ, al siaj administraj klasoj, la kredon, ke tio, kion ili faras, devas esti bona, ĉar ili faras tion. Fiero kutime estas tio: lanĉi grandioze fari tion, kion aliaj homoj opinias malbona, kun la sublima konvinko, ke ĝi devas esti bona, ĉar ĝi estas sincere dezirata. Kaj ĉar per ĉio ĉi la malbonaj instinktoj kaj malbonaj pasioj ne estas subpremataj, la neevitebla rezulto de forgeso pri homaj malforteco kaj erareblo devas esti imagi, ke malbonaj instinktoj kaj malbonaj pasioj estas bonaj, per kiuj ni ne nur Nilasos nin forkonduki. per ili, sed ni prezentos ilin kiel bonajn. Kiu kredas, ke bono ne estas bona, krom ĉar ĝi estas farita de la supera homo, ne nur finos fari malbonon kredante, ke ĝi estas bona, sed ankaŭ predikos malbonon. Ne nur li faros la beston, kredante ke li estas la anĝelo, sed li provos persvadi aliajn, ke la besto estas la anĝelo.

La alia alternativo estas fini kun la bonaj kaj la malbonaj, supozante, ke ili estas nenio alia ol vortoj, per kiuj ni sublimigas niajn preferojn kaj niajn abomenojn. Ne ekzistas vero aŭ mensogo, ĉar ĉiu impresado estas vera, kaj preter la impresado estas nenio. Ne ekzistas bono aŭ malbono. La moralo estas nur armilo

en la klasbatalo. Kio estas bona por la burĝo, estas malbona por la laboristo, kaj inverse. Nenio estas absoluta, ĉio estas relativa. Ĉi tio ankoraŭ estas humanismo, ĉar la homo estas ankoraŭ la mezuro de ĉiuj aferoj. Sed ne plu ekzistas pli altaj mezuroj, ĉar valoroj malaperas, kaj la homo mem, reduktante bonon kaj veron al la kategorio de apetitoj, ŝajnas degradi kaj fali en la beston, tiel ke apenaŭ eblas paroli pri homaranismo.

Nek ĉi tiu malalta materiisma humanismo, nek la alia de fiero kaj supozataj "aprioraj" superecoj, iam profunde penetris en la hispanan popolon. La hispanoj neniam kredis, ke la homo estas la mezuro de la aferoj. Ili ĉiam kredis, kaj daŭre kredas, ke martireco por justeco estas bona, eĉ se ili sentas sin nekapablaj suferi ĝin. Ili neniam pensis, ke la vero povas esti reduktita al la impresado. Kontemplante la faŝadon de domo, ili scias, ke aliaj homoj povas rigardi la korton kaj estas facile por ili korektisian perspektivon per koncepto, kies vero dependas ne de la kohereco de sia penso kun si mem, sed de ĝia korespondado kun la realo de la domo. . Kio estas bona estas bona kaj kio estas vera estas vera, sendepende de individua opinio. La hispanoj kredas je absolutaj valoroj aŭ ili ĉesas kredi tute.



Por ni la dilemo de Dostojevskij fariĝis: aŭ absoluta valoro aŭ absoluta nenieco. Kiam ni ĉesas kredi je la vero, ni etendas nian mantelon sur la teron kaj laciĝas dormi. Sed eĉ tiam ni konservas en niaj koroj la konvinkon ke vero ekzistas kaj ke homoj estas, eble, egalaj. Ni ĉesos kredi al ni mem, sed ne al la vero, nek al aliaj homoj. La relativismo de Sancho rilatas al aristokrataro. Eblas, ke neniam estis kavaliroj vagantaj, kiel imagis ilin ilia sinjoro Don Quijote. Sed la guberniestro de Barataria neniam ĉesis kredi je bono kaj vero.

## La Humanismo de Fiereco

Tiuj ĉi konceptoj pri homo ne estas puraj ideoj, sed priskriboj de la grandaj movadoj, kiuj funkcias en la mondo kaj disputas sian regadon hodiaŭ. Unuflanke, tutaj grandaj popoloj aperas al ni, eĉ tutaj homaj rasoj, animita de la konvinko, ke ili estas pli bonaj ol aliaj rasoj kaj aliaj popoloj, kaj ke ili estas konfirmitaj en ĉi tiu ideo de supereco, kun tiu de siaj rimedoj. kaj rimedoj.de agado. Ĉi tiu kredo de supereco, aliflanke, povas kontribui al produktado de ĝi. Eĉ la islamanoj, nuntempe deprimitaj, havis sian momenton de grandiozo, pro tiu sama persvado. La tago, kiam la araboj kredis sin esti la popolo de Dio, ili konkeris en

du generacioj imperion pli grandan ol tiu de Romo. Ne estas dubo, ke fido je propra plejboneco estas unu el la sekretoj de sukceso, almenaŭ en la fruaj etapoj de la vojaĝo.

En iuj modernaj popoloj ni trovas tiun saman kredon, sed esprimitan per malsama vortprovizo. S-ro Hoover lastatempe difinis la kredon de sia lando kiel la konvinkon, ke sekvante la diktaĵojn de siaj koro kaj konscienco li senmanke antaŭeniros laŭ la vojo de progreso. Estas la postulato de liberalismo, ke se ĉiu homo obeas nur siajn proprajn ordonojn, li disvolvos siajn kapablojn ĝis la maksimumo de siaj eblecoj. Ĉiuj popoloj de Okcidento provis, en ĉi tiuj jarcentoj, alĝustigi siajn politikajn instituciojn al tiu ĉi maksimumo, kiu, pro kiom vaste ĝi disvastiĝis, ŝajnas universala. Ĝi baziĝas sur la romantika konfido de homo je si mem kaj malfido je ĉiuj kredoj krom lia propra. Ĝi supozas, ke kredaroj venas kaj iras, ke ideoj venas kaj iras kiel vestaĵoj, sed ke kiam la homo sukcesas, li progresas. Ĉiuj viroj? Jen la problemo. Ankaŭ la historio montras, ke tiu individuisma libereco ne sentas la samon ĉe ĉiuj popoloj. Estas, ŝajne, liberaj popoloj, duonliberaj popoloj kaj sklavaj popoloj. Kaj tiel okazis, ke la individuisma flago, universala

